

Numero: 250.
Marto: 2013.

21-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbel@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Ĉu ankoraŭ 250?

Mi ankoraŭ rememoras pri tiu momento, kiam mi decidis redakti esperantolingvan gazeton. Tio okazis antaŭ multaj jaroj kaj la unuaj numeroj estis redaktitaj per skribmaŝino.

Estis kiuj priridis min dirante, mi estas tro amatora.

Jes, mi neniam asertis, ke mi redaktos perfektan literaturan gazeton. Laŭ mi perfekta eldonaĵo ne ekzistas. Ĉiam estas pli bona kaj pli bela.

Mi redaktas Vesperton depost pli ol dudek unu jaroj. Mi nur povas esperi, Dio donos al mi almenaŭ tiom da tempo, ke mi ankoraŭ povos redakti 250 numerojn.

Ankaŭ en la estonto ĝi restos senpaga kaj kiu ajn povos disvastigi ĝin senprofite.

Iu ajn povas fariĝi la redaktanto de mia literatura eldonaĵo.

Mi petas Vin, bonvolu apogi min, kaj en la estonto sendadu al mi informojn, sciigojn, verkaĵojn en Esperanto. Ilin laŭeble mi aperigos en Vesperto.

La kontribaĵojn sendu al la sekva adreso:

espbela@t-online.hu

Krome, bonvolu skribi Vian sinceran opinion, kritikon pri mia eldonaĵo. Por mi estas tre grave, ke mi sciu la opinion de miaj legantoj.

Skribu sincere, se io ne plaĉas al Vi. El ĝi mi ekscios, ĉu mi laboras bone aŭ malbone. Do, ne hezitu skribi Vian opinion por helpi min. Eble Via helpo ebligas, ke Vesperto ankoraŭ travivu almenaŭ 250 numerojn.

Ankaŭ en la estonto mi restos je Via dispono kaj mi klopodos redakti por Vi interesan kaj valoran VESPERTON.

-Redaktanto-



Printempa babilado

-Kien vi vojaĝos ĉi somere? – mi aŭdis en la bushaltejo atendante la veturilon.

Viro demandis tion de sia amiko. Mi vole nevole aŭdis ilian babiladon. La alia viro respondis indiferece post iom da pensado:

-Mia edzino deziras somerumi en Italio. Ni ankoraŭ ne estis en tiu lando.

-Ni jam estis tie dufoje antaŭ jaroj. Italio estas admirinda kaj historiicia lando. Krome la homoj estas tre karaj kaj gastamaj.

-Ĉu vi sukcesis komuniki kun ili?

-Bedaŭrinde ne. Ni ne sciis la italan lingvon.

-Ja vi ambaŭ scias angle. Ĉu ne? Ĉi lingvo estas disvastiĝinta en la tuta mondo.

-Vi pravas amiko, sed ne forgesu, ni feriiis en provinca urbeto sude, kie vivis homoj, kiuj apenaŭ konis iun fremdan lingvon. Ni nur balbutis kun ili. Se venontfoje ni vojaĝos al Italio mi nepre ellernos itale por ke mi povu komuniki kun ili. Mi proponas al vi, ankoraŭ estas multe da tempo por lingvolernado. Ne vojaĝu tien, se vi ne parolas ĉi lingvon.

La buso malfruis pro io. La homoj malpacientiĝis.

La du viroj babilis plu.

-Kiom da tempo oni povas ellerni la italan lingvon? – demandis tiu, kiu deziras vojaĝi ĉi somere al Italio.

-Tio dependas de multaj aferoj. Ĉefe de via diligenteco kaj kapablo. Se vi estas sufiĉe diligenta, tiam laŭ mi ĝis la ekveturo vi povos ellerni kelke da gravaj vortoj kaj esprimoj.

-Ĉu mi povos komuniki kun la lokanoj?

-Eble. Sed oni devas lerni lingvon dum longaj jaroj scii ĝin perfekte.

-Mi ne scias. Mi ekprovas la lingvolernadon. Kion fari, se en la venonta jaro ni deziras vojaĝi al Hispanio. Ĉu mi lernu ankaŭ tiun lingvon?

-Jes, amiko, se vi deziras komuniki kun la lokanoj.

-Dio mia, kial ne ekzistas lingvo, kiun ĉiu konas kaj parolas en la tuta mondo.

Intertempe la buso alvenis. La pasaĝeroj enbusiĝis. La du viroj malaperis de antaŭ miaj okuloj kaj mi ne scias, kiel daŭriĝis la babilado en la buso.

-Ŝaŝa-



Kavo

En iu mateno la vilaĝanoj trovis strangan kavon en la limo de la vilaĝo. Neniu sciis, kiel ĝi estiĝis tie.

La kavo estis granda kaj profunda. Kelkaj homoj asertis, ke ĝi estiĝis pro la pluvo. Sed interese, jam de longe tempo en la ĉirkaŭaĵo ne pluvis.

Ili staris ĉirkaŭ la kavo kaj nekompreneme rigardis ĝin.

-Ĝi estas tre profunda – rimarkis unu el la ĉirkaŭstarantoj. – Ĉu io estas ene? Eble de tie ĉi kondukas groto subteren, kie kaŝiĝas la trezoro de grandsinjoroj.

La aliaj priridid lin. Neniu kuraĝis malsupreniri.

-Mankas sufiĉe longa ŝtupetaro por iri malsupren – oni diradis – Se ĝi estus ĉe ni, mi rigardus, kio estas en la profundo. Sed tiel mi ne povas.....

Subite iu el la homoj diris:

-Hejme mi havas longan ŝnuregon. Mi iras hejmen kaj portos ĝin ĉi tien. Per ĝi vi povos malsupreniri. Ni helpos.

La kuraĝulo ektimis kaj serĉante ekscipiojn ekskuzis sin.

-Bone, sed eble tamen via ŝnurego ne estas tiom longa, kio estus bezonata por atingi la fundon. Laŭ mi ni invitu fakulojn malkovri, kio estas en la kavo. Mi konas speleologon en la ĉefurbo. Mi telefonas al li kaj li helpos. Eble danĝere estus malsuprengrimpi por nespertulo. Ĉu ne?

Kelkaj ĉeestantoj denove ekridis.

-Li ektimis. Antaŭ nelonge li deziris malsupreniri.

-Mi tute ne timas, sed tamen ni pripensu la aferon! Neniu scias kio estas ene. Povas esti, ke la muroj falos nin pro la grimrado kaj oni sufokus sub la teramaso. Mi jam aŭdis pri simila kazo. Ĉu mi telefonu al mia konatulo?

La tieaj homoj jam ne aŭdis tiun ĉi demandon. Ili mute staris ĉirkaŭ la kavo kaj ili ĉiuj pensadis, kiel estiĝis tiu ĉi stranga natura fenomeno. Ili ankoraŭ ne vidis tian kavon.

Ekde tiu ĉi tago ofte vizitis ĝin kaj baldaŭ la kavo fariĝis turista vidindaĵo. El malproksimaj regionoj venadis homoj por admiri la strangan kavon en la limo de la vilaĝo.

Kiam jam per aŭtobusoj alvenis la turistoj, la vilaĝestro eltrovis, ke kiu deziras rigardi ilian kavon, tiu pagu por la enirbileto.

Tiel la stranga kavo donis laboreblon kaj profiton por la vilaĝo, kaj la vilaĝanoj ĉiutage benis ĝin preĝante, ke ĝi ne malaperu, ĉar tiam ilia bona vivo ĉesos.

Pasis jaroj, sed ankoraŭ neniuj sciis, kio estas malsupre en la kavo, sed tio neniun interesis.

-Andi Józsa-

Pri imaga vojaĝo

-Fantasta rakonto- VII.

En mia kajuto mi havis strangan sonĝon. Kvazaŭ ĝi estintus realo. Mi sonĝis pri belega ĝardeno, kie nudaj junulinoj dancis. La tuta ĝardeno estas plena de koloraj, bonodoraj floroj. Onidire sonĝante ni ne vidas kolorojn. Tamen mi precize rememoras pri ĉiu koloro. La sonĝo ne estis nigra – blanka. Ĉio koloriskaj la koloroj ĉarmis min.



Mi estis malgaja, kiam matene mi malfermis miajn okulojn. Mi ekprovis denove ekdormi, por ke mi daŭrigu tiun ĉi belegan sonĝon. Bedaŭrinde pro la laŭtaj bruoj ne sukcesis.

Ni enhaveniĝis. Nia eleganta ŝipo alvenis belegan insulon. Pri ĝi ankoraŭ mi ne aŭdis, eĉ ĝi ne estas signita sur mapoj, ĉar ĝi estas artefarita.

Oni pensus, se ĉi insulo estas artefarita, tiam ĝia tereno estas malgranda. Sed ne. De sur la ferdeko mi vidis pitoreskan pejzaĝon kun vastaj arbaroj, floraj kampoj kaj altaj montopintoj. Ĉe la haveno estis animagorda urbeto. Sur la bordo homoj mansalutis nin, kiel atendatajn gastojn. Mi estis tute ravita.

Mia unua penso estis, ke mi frezeniĝis. Eble mia sonĝo daŭriĝas kaj baldaŭe mi vekigos.

Ne tio okazis. Ni ĉiuj elŝipiĝis. Per miaj okuloj unue mi serĉis la hieraŭan ĉarman junulinon, sed ŝin mi vidis nenie. Poste mi volis iri al la kapitano de la ŝipo grafo Bonfarulo. En la malproksimo mi ekvidis lin parolanta kun homoj. Trarompante min tra homamaso mi rapidis al li.

-Sinjoro grafo Bonfarulo, – mi diris al li – kio okazos nun al mi?

Li ekridetis afable, kaj metante sian brakon sur mian ŝultron milde respondis:

-Amiko, ne ĉagrenu! Mi ne forgesiĝis pri vi kaj la fraŭlino Eva. Baldaŭe mi zorgos ankaŭ pri vi. Unue mi devas doni kelkajn ordonojn al miaj subuloj. Ĝis tiam restu tie ĉi sur la bordo, kaj mi revenos.

Liaj vortoj iomete trankviligis min kaj mi sidiĝis sur proksiman benkon. Antaŭ mi ondumis la giganta oceano, sed mi ne sciis kiu...

(daŭrigota)

Poezio

Ivan Naumov Floreto

Mi kisas la vangon ŝatotan. Interne mi ridas –
Pro kvanto da "o" en novelo de nia renkonto.
Sed subas la ridon tremeto: mi jam ne sinfidas,
Ĉar kreskas la dubo: ĉu *mi* tie restas venkonto?

Ne plue mi certas, ke havas animon el brikoj,
Eternaj por tempo, tro firmaj por rompo kaj krevo...
Jen – brikojn disportas popece hastemaj formikoj
Por kre' de moskeoj formikaj al Amo kaj Revo.

Mi ĉasis Liberon, mi ŝatis matenan malplenen
De l' ĉambro, de l' lito, de l' mondo – por nova vespero.
Sed nun – ĉu en plena frenez'?' – mi serĉadas katenon,
Tra miaj kirasaj ridetoj penetras sincero!..

Mi ŝtone rakontas: "Floreto, mi scias petoli.
Min logas okuloj scipovaj kaj lagi kaj steli.
Karonta, mi devas konfesi: kutima pli-oli,
Mi kvazaŭ junulo – esperis kaj strebos plej-eli..."

Mi skize desegnas la mondon de navo laŭ tajdoj,
De rajdo tra kampoj, enombra amoro sub pinoj.
Kaj vi, grandokula, miranta, tuj preta al rajdoj,
Kapklinas al mi, sur la ŝultron kun kalo pro klinoj.

"Aĥ ne, ne rapidu!.. Alteme: vi konas la kanton?..
Gustumu: ĉi-jara apenaŭ similas realon."
Kaj mi, menciante trankvilon, senplaŭdon kaj lanton,
Per mano sunbruna plenigas kvarcvitran pokalon.

Ĉu-flustre, ĉu-pense mi gajas pri via destino:
"Pretiĝu, floreto, mi havos timigan aŭdacon!"
En kvara linio mi rimos vin... Eble, kun vino –
Ĉar ĝuas la lipoj tuŝantaj la ruĝan surfacon.

15.03.92. *Vespere*



Poezio

Ivan Naumov Babelo

Donu al mi fabelon,
Ĉar io almenaŭ restu,
Ĉar io almenaŭ nestu
En pingloza arbusto
de mia obskura anim'!
Kiam oni eniros Babelon
Ĉies vinoj restos sen gusto
Kaj ŝimos en ŝlim'.

Donu al mi intencon
Por io ankoraŭ tremu,
Por iun ankoraŭ emu
Longaj ŝtonaj strataroj
de mia vintroza intern'!
Kiam oni deklaras komencon
Ĉies varmo restos sen tegoj
En frosta kavern'.

Donu al mi nenion
Laŭ jam forgesita moro.
Laŭ jam forgesita foro
Eble glitos ombraro
de mia neĝoja esper'!
Kiam oni ektrovos la Dion
Ĉies dioj restos sen faro
Kaj mortos sur Ter'.

28/29.06.1993



Por infanoj

Printempofeino

La vintro estis longa kaj frosta. En la arbaro la bestoj jam tre malvarmis. Ili ege deziris la alvenon de la printempo.

Ĉi jare ĝi ne volis alveni. La bestoj malgaje kunvenis sur la arbara maldensejo por pritrakti, kion fari.

La forta urso prezidis kaj finaŭskultis ĉiun beston. Sed bedaŭrinde neniu sciis, kion oni devas fari, se la printempo malfruas.

Tio pli malgajigis la loĝantojn de la arbaro. El ili kelkaj jam ekploris kaj ili plorĝemadis amare:

-Ni frostmortos, se ne venos la printempo. Ni pereigos. En la arbaro apenaŭ estas iom da nutraĵo. Kial malfruas la printempo?

Neniu sciis la respondon. Ili nur malĝojadis.

Fine la leporeto ekstaris kaj timeme proponis al la bestoj:

-Ni iru al la printempofeino kaj ni petu ŝin, ke ŝi venu!

Unue neniu volis aŭdi la proponon de la leporeto, sed kiam la forta urso apogis ĝin, ĉiu besto konsentis.

-La leporeto pravas. Ni iru al la printempofeino. Certe ŝi aŭskultos nian plendon kaj ŝi helpos.

Ili elektis delegitaron, kio konsistis el mem la forta urso, lupo, kaj kompreneble leporeto. Ja ĝi proponis tion.

Al la lupo ne plaĉis, ke ankaŭ la leporeto apartenas al la delegitaro, sed la urso ne cedis.

-Ĝi diris al ni ĉi tiun grandiozan ideon, do ĝi meritas, ke ĝi venu kun ni kiel delegitano.



La lupo ne kuraĝis kontraŭdiri. Ĝi vole nevole devis akcepti la leporeton.

Ili tuj ekiris. Efektive el ili neniu sciis, kie loĝas la printempofeino. Ili iris tra arbaroj kaj sur kamparoj ĝis ili alvenis al ruina dometo. En ĝi loĝis centjara maljunulino. Ili demandis ŝin dece:

-Avinjo, ĉu vi scias, kie loĝas la printempofeino?

-Karuloj miaj, vere mi estas centjara, sed mi ne scias kie ŝi loĝas. Mi ne povas helpi al vi. Sed mi proponas iru al mia avino, kiu vivas trans granda lago. Laŭ mi ŝi povos helpi al vi.

La bestoj adiaŭis de la maljunulino, kaj ili iris trans la grandan lagon. Tie ili baldaŭ trovis la avinon, kiu estis tre tre maljuna. Apenaŭ ŝi povis movi. Dum la tuta tago ŝi kuŝis en sia lito.

Ankaŭ ŝi estis senkonsila, kaj la delegitaron ŝi sendis plu al sia avino trans la gigantan monton. Ili eniris ŝian malgrandan dometon, kie ili trovis ege maljunan virinon. Ŝi ne povis ekstari pro la maljuneco. Ŝi sidis apud forno senmove. La bestoj timeme demandis ŝin:

-Karega avino, ĉu vi scias, kie loĝas la printempofeino?

La maljunulino eklevis siajn palajn okulojn al ili kaj ŝi diris:

-Jes mi scias. Mi estas la printempofeino, sed mi malsaniĝis. Pro tio mi ne povis iri al vi. Bonvolu helpi al mi por ke mi resaniĝu!

-Kion ni devas fari? – demandis mire la bestoj.

-Trans la Fabeloceano estas puto. Iru tien, sed rapide, ĉar se ĝis vespero mi ne povos trinki el la akvo de la puto, mi mortos.

La forta urso, lupo kaj la leporeto interrigardis. Ili bone sciis, alporti akvon ĝis vespero estas neebla. La forta urso malbonhumore diris:

-Mi jam estas maljuna. Miaj piedoj doloras min. Mi ne povas iri trans la Fabeloceanon.

Ankaŭ al la lupo ne plaĉis la ideo, kaj ĝi ne emis iri tien. Ĝi proponis al la leporeto:

-Leporeto, vi povas kuregi fulmrapide, iru al la puto kaj portu al la printempofeino akvon!

La longorelulo volonte akceptis la proponon de la lupo kaj ĝi tuj ekiris.



Tiel rapide ĝi kuregis, kiel la vento. Ĝin pelis la deziro, ke ankaŭ en ilian arbaron alvenu la printempofeino.

Ne pasis multe da tempo kaj ĝi estis jam ĉe la puto. Ĝi plenigis la kunportitan botelon kaj reiris al siaj amikoj, kiuj malpacience atendis ĝin.

La leporeto feliĉe transdonis la akvon al la maljunulino, kiu trinkis el ĝi kelkajn da gutojn. Tiam okazis miraklo. El la maljunulino fariĝis belega, juna knabino. Ŝi estis mem la printempofeino.

-Ni rapidu! – ŝi diris – Viaj amikoj jam atendas nin en la arbaro.

La junulino ordonis al la vento kaj ili sidiĝis sur ĝian dorson.

La forta urso, lupo kaj leporeto apenaŭ okupis sidlokon sur la dorso de la vento, ili jam estis en la arbaro.

Kiam la printempofeino paŝis sur la teron, ĉiu ekfloris kaj verdiĝis. La loĝantoj de la arbaro ĝojegis, ĉar jam ankaŭ en ilia arbaro estis belega, bonodora printempo.

-Onklo Adalberto-

Belaj bildoj

Belaj bildoj

